Sukcesplena Ponta Festo en Frankfurto kaj Słubice, sed kun eta larmo

Kiam mi ĝojplene alvenis en la stacidomo de Frankfurto mi nur vidis du konatajn esperantistinojn el Berlino kaj Prenzlaŭ. Baldaŭ ili informis min, ke aliaj berlinanoj alvenos per propra aŭtomobilo. Dieter kaj Elena Wilke el Schwedt sekvis. Je 11:30 h komenciĝis la urba rondiro ĉe la stacidomo. La ĉeestintoj eksciis koncize iom pri la situo de Frankfurto kaj pri la historio de fervojo kaj stacidomo. Post tio ni komune iris al la hotelo „Malnova Odro“ laŭ mia strato “Gubener Straße” por montri al ili, kie mi loĝas. La enurban herbejon antaŭ la hotelo ni transiris tra paviliono, kiu troviĝas ĉe la fino de la parko. De tie videblis diversaj konstruaĵoj, kiujn mi klarigis. Ni sidis poste pli ol 30 min ekstere de la hotelo por trinki iomete. La plua vojo kondukis nin super la insulo “Ziegenwerder” laŭ la riverbordo al la odra promenejo, de kie ni atingis la ejon de la urba Ponta Festo. Tie ni havis iom da tempo por manĝi, trinki kaj rigardi, kio okazadas dum la festo. Ĉar abundis homoj tie, ni ne komune marŝis tra la festejo, sed renkontiĝis je 14:30 h ĉe la rando de la ponto por iri komune al la restoracio “Kafejo ĉe Kleistparko”, kie okazis eta publika estrarkunsido. Kiam ni alvenis, ni jam estis atendataj de tri aliaj esperantistoj el Berlino kaj Radomiecko. Dum la kunsido ni i.a. decidis, ke ni proponas la inviton de Germana kaj Pola Esperanto Kongresoj al Berlino en la jaro 2012. Necesos multaj preparoj, sed ni jam havas spertojn rilate al U.K. kaj la pasintdecembra Zamenhofsemajno. Ankaŭ ni okulfrape reklamis por la sekvonta aranĝo en Brandenburgio, kiu okazu je la 9-a de junio en Prenzlaŭ. En la ĉefurbo de la subdistrikto Uckermark denove estas atendataj multaj amikoj el diversaj ĉieldirektoj. Invitilo sendiĝas laŭ la tradiciaj kanaloj.
Jam je la 17-a horo ni povis fini la estrarkunsidon kune kun kaftrinkado. Kelkaj partoprenantoj havis la deziron viziti la faman Kleist-muzeon, do ni rekte iris tien. Je 18:45 h ni renkontis la amikojn el Buk kaj Poznano je la pola flanko de la urba ponto. Vespera ĉefa programero estis la komuna babilado, manĝado kaj trinkado en ĉina restoracio de Słubice. De tie Janusz Dyda i.a. transportis la berlinajn esperantistojn al la stacidomo, kie parkis la aŭtomobilo de ili. Je la 10-a horo vespere ni bedaŭrinde ĉiuj forlasis tiun ejon, ĉiu en alian direkton.
Entute partoprenis 16 personoj la Pontan Feston de Esperanto, el kiuj kelkaj havis longan vojon al kaj de Frankfurto.
Jam decidiĝis, ke sekvontjare denove okazu Esperanto-stando dum la Ponta Festo, ke gastoj havu daŭran alirpunkton. Kulmino estu “Esperanto-limonado”.
Bedaŭrinde Ryszard kaj Zofia el Bytom Odrzańsk ne trovis nin en la festo, ĉar ili iomete malfruis. Do ili entreprenis propran rondiron tra la urbo sen renkonti la partoprenantojn de nia aranĝo. Tio estis la unusola malbonaĵo de la renkonkto. Eĉ la vetero estis laŭ nia gusto.
Per tio mi dankas al ĉiuj, kiuj ebligis tiun unikan etoson kaj la sukceson de “nia” Ponta Festo. Ek al la sekvonta!
Ronaldo